

Enhavo

- | | |
|--|-------|
| ☞ Nia ĉipo iras antaŭen | 3-8 |
| ☞ <i>Julián Hernández Angulo</i> | |
| *** | |
| ☞ Resumen de UNIVERSO | I-IV |
| ☞ <i>Juan Ramón Rodríguez Gómez</i> | |
| *** | |
| ☞ Pensoj pro la XIX-a datreveno de KEA | 9 |
| ☞ <i>Juan Lázaro Besada Toledo</i> | |
| *** | |
| ☞ Fransiska kaj la Morto (☞ Onelio J. Cardoso) | 10-12 |
| Trad.: <i>Norberto Díaz Guevara</i> | |
| *** | |
| ☞ Libroservo raportas | 13-15 |
| ☞ <i>Juan Ramón Rodríguez Gómez</i> | |
| *** | |
| ☞ Nia estonteco vibras | 16 |
| ☞ <i>Julián Hernández Angulo</i> | |


Estimataj:

La oficiala organo de KEA daŭrigas la publikigon de gravegaj dokumentoj rilataj al nia movado: en la unua numero de la jaro, ĝi inkludis la Estraran Raporton '97; ĉi-kaze, aperas fragmentoj de la parolado de nia prezidanto en la centra nacia aranĝo okaze de la XIX-a datreveno de KEA.

Krome, AVANCO riĉiĝas per literaturo: Fransiska kaj la Morto, rakonto de Onelio Jorge Cardoso, elstara kuba verkisto, el kiu tiu ĉi informilo publikigis Tosto por zozzo, en sia unua apero (16-an de junio 1989).

Cetere: Ĝenerala katalogo de la KEA-libroservo, raporto pri la I-a Nacia Infanrenkontiĝo, la jam kutima resumo de UNIVERSO, ktp..

J. Ramón



NACIA ESTRARO

*Julián Hernández Angulo
Prez.. Atentas plenumon de
ĉiuj taskoj kaj fakoj.

*Maritza Gutiérrez González
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas
Internan agadon.

*Alberto Rodríguez Pineda
Financoj, k. administrado
de la Centra Oficejo.

*Héctor Jiménez Batista
Instruado k. ILEI-Sekcio.

*Juan Ramón Rodríguez Gómez
Informado, Historio, Bibl., Libro-
servo kaj Ameriko. Ĉefredaktoro de
Avanco, La Noktuo kaj Universo.

*Pedro Fernández Rodríguez
Kulturo. Artaj k. klerigaj aranĝoj.


Komisiitoj

*Martha Alonso Gutiérrez
Turisma agado.

*Juan Lázaro Besada Toledo
Atento al verkistoj.

*Alberto García Fumero
Scienco kaj tekniko.

X-a jaro, nro. 1 (2/98, maj.-aŭg.) / Aperas 3 foje jare / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 401364 k. 404484 / Fakso: 537 338729 / Ĉefred. k. grafika aranĝo: Juan Ramón Rodríguez / Retadreso: kubesp@ip.etecsa.cu kaj <http://www.infocom.etecsa.cu/new/esperanto/index.htm> / Revizio kaj korektado: Maritza Gutiérrez / Kunlaboris: Julián Hernández kaj Juan Lázaro Besada / Komputila aranĝo: Roberto Molina / Prezo: 1:00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reprodukt. permesata (indiki fonton kaj sendi 2 ekz. al la Redakcio).



Julián Hernández, la aŭtoro, kantas kaj muzikumas Tiel la mondo iras. Kunkantas Georgina Almanza kaj Martin Castro (eksa estrarano de KEA). (Foto: Alejandro García.)

Malgraŭ malfacilaĵoj

NIA ŜIPO IRAS ANTAŬEN

(Fragmentoj de la parolado de Julián Hernández Angulo, prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, en la centra nacia aranĝo okaze de la XIX-a datreveno de KEA, en la Domo de la Kuiristoj, Centro-Havano, la 13an de junio, 1998.)

(...) ŝajnas ke antaŭhieraŭ, aŭ la antaŭa semajno, ni celebris la 18an datrevenon de KEA; tamen, hodiaŭ ni faras tiun ĉi aranĝon por omaĝi la XIX-an datrevenon de nia Asocio. La esperantista familio, la kubaj e-istoj festas sian datrevenon.

Kompreneble, datreveno estas momento por analizi, momento por mediti, kaj momento por pensi kion oni faris kaj kion ankoraŭ farendas. Tion, ni faros hodiaŭ, laŭte, kaj mi pensas ke tiel mi interpretos la sentojn kaj la pensojn de la e-istoj kiuj estas ĉi tie, kaj ankaŭ de tiuj e-istoj kiuj ne estas ĉi tie kaj multe laboras por la evoluo de Esperanto en nia lando.

Dum la jaro 1998 -certe, 1997 kaj parto de la jaro '98, ni diru pli precize-, ni multe faris por Esperanto, favore al E-o, kaj por la evoluo de E-o en nia lando.

Ni komprenas kaj konscias ke ardaj, laboremaj e-istoj, sindonemaj e-istoj, multe ambicias ĉar ili deziras ke niaj idealoj, ke nia laboro, multe pli evoluu, kaj ke ĝi estu multe pli fruktodona, kaj venas la kontraŭdiro inter realo kaj ambicio. La ambicio multe pli flugas, multe pli iras, multe pli marŝas antaŭen; en la realo estas kelkaj malfacilaĵoj, kiuj, kelfoje, estas obstakloj por ke niaj idealoj, por ke nia laboro, multe pli evoluu.

Tamen, estas pluraj atingoj. Ni, do, agnosku, kaj honeste kaj sincere diru ke estas multaj atingoj. Ili povas esti multe pli; sed, ni konscias ke ili estas sufiĉaj.

(...) dum la periodo de la jaro '97 kaj dum tiu ĉi periodo de la jaro '98, ni faris plej diversajn aranĝojn, kaj ni multe laboris kaj, ĝuste pro tio, la NE de KEA decidis elstarigi la laboron de tiuj aktivuloj niaj, de tiuj motoroj niaj, de tiuj e-istoj de nia familio, kiuj multe faris tra la tuta lando por ke E-o fakte estu venko, estu realo, firma realo en nia lando. Eble, eskapis al ni kelkaj nomoj de personoj kies laboro estas ankaŭ elstara kaj mi, nome de la NE, petas senkulpigon, se okazas tiel.

Sed, bone, laŭ niaj konsideroj, laŭ nia vido, tiuj estas la homoj kiujn ni konsideras ke laboris, laboras kaj laboros por KEA. Mi deziras ke, en la estonteco, estu multe pli da nomoj tie, ĉar tio fakte respegulos kaj diros al ni ke ne nur trideko da personoj faras la plej elstaran laboron en nia lando, sed ke centoj da personoj faras tiun laboron kaj, certe, tion ni bezonas.

(...) post la XVIII-a datreveno de KEA, kiun ni celebris en la sidejo de Centro-Havano, ni faris la Seminarion por Instruistoj, kiu estis ege sukcesa; poste, delegacio de KEA vojaĝis eksterlandan por partopreni la Hispanan kaj la Eŭropan Kongresojn (en tiu ĉi kazo, la ĝenerala sekretariino, Maritza Gutiérrez, reprezentis nin tie); mi, nome de KEA, vojaĝis al Aŭstralio, por partopreni la 82an UK-on (...)

En tiu Kongreso, mi rimarkis kaj konstatis kiom multe da esperantistoj de la internacia E-komunumo amas nian movadon kaj amas nian landon, kiom da simpatiantojn ni havas tra la tuta mondo, ĉar, plurfoje, multaj e-istoj demandas al ni pri iliaj amikoj, kiel ili fartas, kaj tio, fakte, estas pruvo ke la kubaj e-istoj estas amataj k. konsiderataj de multaj e-istoj tra la tuta mondo, de la internacia E-komunumo.

(..) ankaŭ dum tiu periodo, julio-aŭgusto, reprezentanto de la E-filio en Stgo. de Cuba, la prezidanto de MF Stgo. de Cuba, Sro. Pedro E. Peña, vojaĝis al Italio, por partopreni la landan kongreson de la italiaj e-istoj kaj, okaze de lia vizito al Trieste (Italio), ili faris ĝemeliĝon inter la triestaj e-istoj kaj la e-istoj de provinco Stgo.

(...) dum tiu periodo, ankaŭ ni faris kelkajn naciajn renkontiĝojn: unu (...) en Sancti Spiritus; alia (...) en Guantánamo. Ankaŭ, ni mencias la Simpozion Fernando Ortiz kaj la 15an Komitatkunsidon en Bayamo.

Kompreneble, nepre ni devas paroli pri la ĉefaj laborsferoj de la Asocio, kiuj estas la

Jenaj: Informado, Instruado, Kulturo, Financo, Publikaj Rilatoj, Internaciaj Rilatoj, Scienco kaj Tekniko kaj Turismo.

INFORMADO

(...) dum tiu periodo, daŭre ni klopodis kaj sukcesis aperigi niajn bultenojn (**Avanco** kaj **La Noktuo**) kaj ankaŭ ni eldonis novan bultenon (**Universo**) por informi al la funkciuloj de la diversaj registaraj institucioj kaj kulturaj institucioj.

(...) mi devas starigi la daŭran laboron de la programo de Radio Havano-Kubo, kiu dissendas, en E-o (...) la realon de nia movado kaj informas al la internacia E-komunumo kion ni faras, kion la e-ista movado en Kubo faras.

(...) ni iom avancis en la persona informado (informado kiun ni, kiel e-istoj, faras en nia medio, en nia laborejo, por ke la homoj multe pli konatiĝu kun E-o kaj sciu pri la signifo de E-o).

Kompreneble, ni scias ke ni devas multe labori sur la kampo de Informado por ke pli kaj pli da homoj interesiĝu pri E-o kaj konatiĝu kun la IL kaj ties movado. Specialan atenton mi volas doni al la grafika propagando, ĉar vi ĉiuj konscias kiom grava estas la grafika propagando, ĉar eble oni povas havi intervjuon en la radio, en la televido; tamen, tio estas momento, sed la grafika propagando multe efikas.

Mi konsideras ke, por la estonteco, ni devas, sur la kampo de Informado, daŭre plenumi tiujn aspektojn pri kiuj mi jam parolis: temas pri tiu afero de la bultenoj, tiu afero de la personaj kontaktoj, tamen ni devas multe pli emfazi en la grafika propagando.

Ni ĵus muntis (...) ekspozicion en la Nacia Biblioteko; sed, ni klopodos ke tiu ekspozicio ne ĉesu je la fino de julio, ni klopodos ke tiu ekspozicio itineru tra la diversaj bibliotekoj kiujn ni havas en nia urbo kaj ke, ankaŭ, la e-istoj en diversaj provincaj filioj faru ekspoziciojn, por ke ili pli kaj pli propagandu kaj informu al la publiko, al la kubanoj, pri E-o.

INSTRUADO

(...) ni faras niajn regulajn kursojn; nian PKK-on, por tiuj personoj kiuj ne povas regule ĉeesti niajn regulajn kursojn; kaj ankaŭ distancan kurson por niaj aktivuloj, por niaj ĉefaj aktivuloj. Ni daŭre devas labori tiucele por ke, pli kaj pli da personoj lernu la IL-on (...) kaj ke ili ricevu bonan edukon en rilato kun la idealo de E-o kaj ke ili multe pli konatiĝu kun la historio, kun la kulturo de la internacia E-komunumo.

FINANCO

(...) dum la jaro '97 kaj parto de '98, ni sukcesis ke la membroj de la Asocio pagu la kotizon, ĉar memoru ke ni memfinancas, kaj kompreneble ni ankaŭ klopodu vendi la materialojn kaj instrui kursojn, ĉar nur tiel ni povas garantii la ekonomion de nia Asocio.

KULTURO

(...) E-o estas lingvistika fenomeno, socia fenomeno, sed ankaŭ kultura fenomeno. Ni ne rajtas forgesi pri tiu ĉi aspekto, kiu estas ege grava por ni kaj kiu donas utilon al nia movado k., pro tio, al nia lingvo. Tio signifas ke mi volas ke vi konsciiĝu ke E-o ne nur estas lernejo aŭ klasoĉambro. E-o estas multe pli ol tio (...) ni daŭre devas eksploati ĉiujn eblecojn por profiti la diversajn kulturajn instituciojn k. por pliriĉigi la e-istan movadon tra la tuta lando, surbaze de niaj rilatoj kun profesiaj k. amatoraj artistoj kaj ke nia esperantistaro pli kaj pli konatiĝu kun la historio kaj kulturo de nia movado.

Jam en kelkaj podioj, lokoj, renkontiĝoj kaj kunsidoj, ni emfazis kaj akcentis ke ni devas batali kontraŭ analfabeteco de e-istoj. E-istoj, unue, lernu bone E-on; e-istoj, konsciu ke nia movado estas intelekta movado kaj ke ĉiuj kiuj estas ĉi tie, laŭ la diversaj talentoj, kompreneble -k. ni devas akcepti tion-, devas klopodi pli kaj pli lerni la lingvon, kaj pli kaj pli konatiĝi kun la historio kaj kulturo de la lingvo. Tio estas ege, ege, grava por ni kaj, kompreneble, tiu estas unu el la celoj de nia ĉiutaga, nia daŭra laboro. Ni ne povas preteratenti tiun gravan aspekton.

PUBLIKAJ RILATOJ

(...) niaj publikaj rilatoj marŝas bone, eble ili povas esti pli bonaj, sed konsciu ke ni ne estas profesiaj laboristoj: ĉiu aktivulo de la Asocio faras allan laboron kaj ne povas dediĉi la tutan tempon al la laboro por E-o.. (...)

Tamen (...), en niaj publikaj rilatoj, ni ne ĉiam povas frapi la pordojn de funkciuloj k. de diversaj institucioj, petante, nur petante; ni konsciu ke ni ankaŭ devas partopreni la socian vivon de la teritorio kie ni estas kaj kontribui al la pliriĉigo de la kultura kaj socia vivo de nia teritorio; nur tiel, niaj sociaj rilatoj, niaj publikaj rilatoj, estos pli fruktodonaj.

Kiam la funkciuloj konscias ke la e-istoj ne nur iras ĉe ili por peti, sed ke ili ankaŭ kontribuas, ke ili ankaŭ helpas, plej diversmaniere, ilia sinteno en rilato kun E-o estas multe pli bona, multe pli favora. (...) estas ege grava ke ĉiu aktivulo de la Asocio, ke ĉiuj municipaj estraranoj, provincaj estraranoj kaj ni, kiel naciaj estraranoj, konsciu pri tio.

INTERNACIAJ RILATOJ

En Internaciaj Rilatoj (...), ni faris tre bonan laboron; kompreneble, ni havas multe pli da bonaj teknikaj rimedoj por tion fari: elektronikan poŝton, ni jam havas; ni havas diversajn rimedojn kiuj helpas nin fari pli bonajn internaciajn rilatojn kaj multe pli rapide komunikiĝi kun la diversaj E-organizaĵoj kaj institucioj tra la tuta mondo. (...) niaj rilatoj kun UEA estis tre bonaj, niaj rilatoj kun ILEI ankaŭ estis tre bonaj; ni kontribuis al la evoluo de E-o en (...) Ameriko, kaj rilatiĝis kun multaj landaj asocioj tra la tuta mondo.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

Ni ankoraŭ devas multe pli labori sur la kampo de Scienco kaj Tekniko, ĉar tiu estas kampo kiu donas multe da utiloj al E-o. Estas pluraj e-istoj kiuj laboras sur tiu kampo kaj

estas ege bonvena kion ili faras kaj faros por multe pli apliki E-on en Scienco kaj Tekniko (...), kaj tio estas danko al la kiopodoj kaj streboj de kelkaj e-istoj, inter ili S-ino Marta Alonso, kiu multe laboras sur tiu kampo.

PERSPEKTIVOJ DE LA ASOCIO

(...) ni -kaj mi parolas nome de la naciaj estraranoj kaj la naciaj komitatanoj de KEA- daŭre laboros por ke nia movado, por ke nia Asocio, estu fruktodona, por ke nia movado estu pli vigla, kaj pli forta.

En la estonteco, ni havos gravajn aranĝojn, kiujn jam kelkaj el la antaŭaj parolantoj menciis; sed, kompreneble, ni ankaŭ devas emfazi kaj atentigi vin pri tiuj aranĝoj. Inter ili, de la 16a ĝis la 18a de julio, ni faros la Ian Nacian Infanrenkontiĝon, en Guantánamo; poste, delegacio de KEA vojaĝos al Montpellier (Francio) por partopreni la 83an UK-on kaj la ILEI Konferencon; en septembro, ni faros Nacian Renkontiĝon en Holguín; en novembro, ni faros la IIan Kulturalan Festivalon de E-o.

Kaj, jam en la jaro '99, ni planas okazigi la IIIan Nacian Kongreson de KEA (ni jam faras demarŝojn kaj pretigas kondiĉojn por ke tiu evento nia estu sukcesa, kiel estis sukcesa nia Ila Kongreso). Ni multe devas labori por ke niaj celoj estu multe pli plenumataj aŭ plenumitaj por tiu evento.

Ni, en la venonta jaro, okazigos la XXan datrevenon de KEA kaj ni tre sindoneme, tre serioze k. tre respondece, devos labori por celebri tiun gravan kaj rondan datrevenon de la Asocio, kiel ĝi vere meritas, kiel vere decas al bonaj e-istoj.

(...) ni devas labori por ke nia esperantistaro, por ke ĉiu e-isto unuope, fariĝu vere aktiva e-isto. En la Asocio, en la movado, ni havas pasivajn e-istojn kaj aktivajn e-istojn. Ni konscias ke ni devas labori kun ĉiuj, kaj ke ili ĉiuj devas esti en nia ĉaro, ĉar nur tiel nia Asocio povas avanci; sed ni devas labori por ke multe pli da pasivaj e-istoj fariĝu aktivaj e-istoj, kaj ke ili estu motoroj por (...) labori por E-o, por informi pri E-o, kaj produkti e-istojn, tie kie ili loĝas, tie kie ili laboras, kaj unu el nia kompromisoj kaj celoj por la XXa datreveno de la Asocio estas ke, almenaŭ, ĉiu e-isto produktu alian e-iston, surbaze de sia laboro; tio estas ege grava.

Ni devas labori, ankaŭ, por ke ĉiu e-isto konsciu ke E-o ne nur estas lingvo: E-o estas interna ideo, interna ideo kies ĉefa celo estas la progreso de la homaro, la paco en la tuta mondo, solidareco inter la diversaj homoj de la mondo, kaj tio ja estas vere trezora k. grava k. bela idealo, k. ĉiu e-isto devas konscii pri tio.

Ni, kiel e-istoj, havas multajn fenestrojn kaj pordojn malfermitajn al la mondo. Pere de E-o, kiu estas IL, ni povas rilatiĝi kaj komunikiĝi kun multaj personoj en la mondo; pro tio, E-o por ni devas esti komunikilo por disvastigi la realon de nia Asocio, la realon de nia Revolucio, la realon de nia lando, ĉar fakte tio estas ankaŭ maniero por ke multaj personoj tra la tuta mondo konatiĝu kun nia lando, konatiĝu kun la avancoj kaj atingoj de

socio, kaj tio estas ege, ege, grava por ni. Ankaŭ ni tion faris, sed mi kredas ke ni daŭre devas fari tion.

En la pasinta jaro, UEA lanĉis la Kampanjon 2000, kiu celas pli disvastigi E-on, pli rilatiĝi kun la ekstera publiko k. klopodi plifortigi la e-istan movadon k. la internacian E-komunumon. Tiuj e-istoj kiuj ankoraŭ ne (...) studis aŭ legis ĝin, ni Invitas (...) tion fari, ĉar tiu estas ege grava en la nuntempo por la vivo de la internacia E-komunumo. La Kampanjo 2000 ĉefe celas la eksteran publikon por gajni pli da interesitoj por E-o, por gajni pli da amikoj por E-o.

Por fini mian paroladon, mi volas speciale danki al ĉiuj e-istoj de nia lando, kaj eble vi povas multoblige miajn dankojn al tiuj e-istoj kiuj ne estas ĉi tie, ĉar ili ne venis, aŭ ili havis problemojn, aŭ ili loĝas en aliaj provincoj, sed multoblige tiun dankon, ĉar fakte ni havas multajn personojn kiuj laboras por E-o kaj, almenaŭ, ion faras por E-o, ĉiutage, ĉiusemajne, ĉiunonate kaj tra la tuta jaro.

Ankaŭ al la naciaj komitatanoj de KEA, kiuj multe laboras por E-o; ankaŭ al la membroj de la NE de KEA, kiuj laboras teame, kohere, kaj tre sindoneme por ke la familio e-ista en nia lando iom post iom avancu.

Permesu al mi danki al S-ro. Juan Ramón Rodríguez, kiel estrarano pri Informado; al S-ro. Alberto Rodríguez, kiel estrarano pri Financo; al S-ro. Pedro Fernández, kiel estrarano pri Kulturo; al S-ino. Maritza Gutiérrez, kiel ĝenerala sekretario de la Asocio; k. al S-ro. Héctor Jiménez, estrarano pri Edukado (bedaŭrinde, li ne estas ĉi tie ĉar verŝajne li malsanas); al la naciaj komisiitoj de la Asocio, ĉar dank' al ĉiuj e-istoj, dank' al ĉiuj komitatanoj kaj naciaj estraranoj, fakte tiu ŝipo iras antaŭen; malgraŭ diversaj malfacilaĵoj, la ŝipo iras antaŭen, la ĉaro iras antaŭen kaj la familio bone, bone fartas.

Nia laboro fakte estas bona kaj ni konscias ke la pioniroj de la E-ista movado en la mondo: la Majstro, Ludoviko Lázaro Zamenhof, kaj multaj aliaj personoj, kiuj fine de la XIXa jarcento k. dum la tuta XXa jarcento, laboris, kaj laboras por E-o, mi certas ke ili rekonas, agnoskas kaj konsideras nian laboron, kaj ke ili, kiel ni, estas fieraj pro la laboro kiun ĉiu e-isto tra la tuta lando faras por E-o.

Ni nur volas inviti vin daŭre labori por ke E-o estu bela floro en nia lando, bela floro en nia kontinento, granda motoro tra la tuta lando, kaj ni laboru por celebri la XXan datrevenon de la Asocio kiel ĝi vere, vere decas.

Nome de ĉiuj esperantistoj kaj nome de ĉiuj naciaj estraranoj, mi deziras esprimi, al vi ĉiuj,

Korajn dankojn.



Resumen de UNIVERSO

UNIVERSO, boletín bimestral de KEA, en Español

CONCURSO «XX ANIVERSARIO DE KEA»

La Comisión de Historia, de la Asociación Cubana de Esperanto (KEA), convoca al concurso «XX Aniversario de KEA», en dos etapas, con diferentes límites de entrega, requisitos y premios, pero siempre bajo el tema «Historia del movimiento esperantista en mi municipio (o provincia)».

En ambos casos, pueden participar todas las personas que así lo deseen (sean esperantistas o no), incluidos los miembros de honor de KEA y los integrantes de la Comisión en todo el país.

PARA LA PRIMERA ETAPA

1.- Fecha límite de entrega: 30 de septiembre de 1998 (plazo ya vencido).

PARA LA SEGUNDA ETAPA

1.- Fecha límite: 30 de abril de 1999.

2.- Los trabajos podrán ser entregados en Esperanto o en Español.

3.- La extensión mínima será de 10 cuartillas, de 30 líneas, mecanografiadas a dos espacios y con 60 golpes de máquina por línea (tal extensión excluye fotos y otros documentos, referencias y bibliografía, elementos que deben adicionarse para enriquecer el texto y darle mayor precisión científica).

4.- Los resultados se darán a conocer el 14 de mayo de 1999, en ocasión de cumplirse el aniversario 71 de la presentación de «El problema de una lengua auxiliar internacional y su solución: el Esperanto», tesis de doctorado en Filosofía y Letras, defendida por Elias J. Johns, en la Universidad de La Habana, el 14 de mayo de 1928.

5.- Premios:

-Primero: Estancia de fin de semana (4 días) en un centro turístico, con un acompañante (si el concursante es esperantista), invitación a participar de las actividades centrales de KEA por su XX aniversario (fundada el 16 de junio de 1979), publicación de la obra en *Avanco*, y libros, revistas y otros materiales en Esperanto.

- Segundo: Fin de semana (3 días) en un centro turístico, publicación de la obra en AVANCO, \$200,00 (M.N.), y materiales en Esperanto.
- Tercero: Publicación del trabajo en el órgano oficial de KEA, \$200,00 (M.N.) y materiales diversos en Esperanto.

Todos los premios serán únicos: en el caso de que un trabajo premiado corresponda a un equipo, entre sus integrantes deben decidir quién lo disfrutará, y la parte material distribuirla entre todos.

Las obras se enviarán a: Juan Ramón Rodríguez Gómez, apartado 5120, Cp. 10500, Ciudad de La Habana.

Es un derecho de la Comisión de Historia conservar todos los textos participantes, para enriquecer sus archivos y preparar una edición con ellos, más otros que obran en nuestro poder.

C. de La Habana, 21 de febrero de 1998.

(Tomado de UNIVERSO, no. 5, enero-febrero '98, pp. 3-4.)



U N I V E R S O

6

Boletín bimestral de la Asociación Cubana de Esperanto (KEA)

Fernando Ortiz y su quehacer en favor del ESPERANTO*

Por JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ



U N I V E R S O

8

Boletín bimestral de la Asociación Cubana de Esperanto (KEA)

El Esperanto en las relaciones internacionales*

Por JUAN LÁZARO BESADA TOLEDO

*Conferencias presentadas por ambos autores en el simposio «Fernando Ortiz y el Esperanto», efectuado el 10 de diciembre de 1997, en la sede de la Asociación Cubana de Naciones Unidas, en Ciudad de La Habana.

De fiesta los esperantistas

Diecinueve años de quehacer exitoso e ininterrumpido celebra la Asociación Cubana de Esperanto (KEA), inmersa en sus objetivos de expandir por toda Cuba esa lengua internacional y sus presupuestos de comunicación humana mediante la igualdad lingüística y el enriquecimiento cultural y espiritual de quienes la practican.

Fundada oficialmente el 16 de junio de 1979, en Ciudad de La Habana, KEA ha mantenido un trabajo sistemático y creciente, pese a limitaciones y dificultades, lo que le ha permitido éxitos relevantes en sus proyecciones, como la realización en el país de varios eventos internacionales; entre ellos, las conferencias técnicas Esperanto '86 y Esperanto '88, el 75 Congreso Universal y el 46 Congreso Internacional Juvenil, los tres primeros en el Palacio de las Convenciones y el último, en Playa Girón.

También se destaca la participación activa en todos los expolinguas realizados en el país, las ferias internacionales del libro, encuentros de traductores, conferencias de diversa índole, y sus propios eventos nacionales de Ciencia y Técnica, de médicos esperantistas, la publicación de varios libros en esa lengua por parte de la Editorial José Martí, etc..

En la actualidad, KEA posee filiales provinciales y municipales, o grupos locales, en todo el país, incluida la Isla de la Juventud, en los que mantiene cursos regulares, de perfeccionamiento y uno por correspondencia, al que se adscriben muchos que no tienen posibilidades reales de asistir a las aulas sistemáticamente.

Los festejos por el XIX aniversario se celebran en el país durante todo el año. Múltiples son las celebraciones: encuentros nacionales en Cienfuegos (mayo), Holguín (septiembre) y Guantánamo (diciembre), exposición «Esperanto: Lengua, Cultura, Movimiento» (Biblioteca Nacional, todo junio), I Encuentro Nacional Infantil (Guantánamo, julio), Seminario Nacional para Profesores (C. de La Habana, julio), Festival Cultural Nacional (Santiago de Cuba, noviembre), etc..

El pasado 13 de junio, se efectuó en Ciudad de La Habana la actividad central nacional por el nuevo aniversario de KEA, momento propicio para el reconocimiento individual y colectivo a quienes se han destacado durante el período, y punto de partida hacia el XX aniversario, en 1999, cuyo punto culminante será la celebración del III Congreso de la Asociación Cubana de Esperanto, objetivo para el cual ya se labora intensamente.

(Tomado de UNIVERSO, no. 7, mayo-junio '98, p. 1.)

De fiesta los esperantistas

Diecinueve años de quehacer exitoso e ininterrumpido celebra la Asociación Cubana de Esperanto (KEA), inmersa en sus objetivos de expandir por toda Cuba esa lengua internacional y sus presupuestos de comunicación humana mediante la igualdad lingüística y el enriquecimiento cultural y espiritual de quienes la practican.

Fundada oficialmente el 16 de junio de 1979, en Ciudad de La Habana, KEA ha mantenido un trabajo sistemático y creciente, pese a limitaciones y dificultades, lo que le ha permitido éxitos relevantes en sus proyecciones, como la realización en el país de varios eventos internacionales; entre ellos, las conferencias técnicas Esperanto '86 y Esperanto '88, el 75 Congreso Universal y el 46 Congreso Internacional Juvenil, los tres primeros en el Palacio de las Convenciones y el último, en Playa Girón.

También se destaca la participación activa en todos los expolinguas realizados en el país, las ferias internacionales del libro, encuentros de traductores, conferencias de diversa índole, y sus propios eventos nacionales de Ciencia y Técnica, de médicos esperantistas, la publicación de varios libros en esa lengua por parte de la Editorial José Martí, etc.

En la actualidad, KEA posee filiales provinciales y municipales, o grupos locales, en todo el país, incluida la Isla de la Juventud, en los que mantiene cursos regulares, de perfeccionamiento y uno por correspondencia, al que se adscriben muchos que no tienen posibilidades reales de asistir a las aulas sistemáticamente.

Los festejos por el XIX aniversario se celebran en el país durante todo el año. Múltiples son las celebraciones: encuentros nacionales en Cienfuegos (mayo), Holguín (septiembre) y Guantánamo (diciembre), exposición «Esperanto: Lengua, Cultura, Movimiento» (Biblioteca Nacional, todo junio), I Encuentro Nacional Infantil (Guantánamo, julio), Seminario Nacional para Profesores (C. de La Habana, julio), Festival Cultural Nacional (Santiago de Cuba, noviembre), etc.

El pasado 13 de junio, se efectuó en Ciudad de La Habana la actividad central nacional por el nuevo aniversario de KEA, momento propicio para el reconocimiento individual y colectivo a quienes se han destacado durante el período, y punto de partida hacia el XX aniversario, en 1999, cuyo punto culminante será la celebración del III Congreso de la Asociación Cubana de Esperanto, objetivo para el cual ya se labora intensamente.

(Tomado de UNIVERSO, no. 7, mayo-junio '98, p. 1.)

Breves del aniversario 19

Del 10 al 12 de abril, la base de campismo Las Caletas, en el Litoral Norte, sirvió de escenario para que más de 60 capitalinos (esperantistas con familiares y amigos), en contacto con la naturaleza, festejaran dos acontecimientos: los 10 años de oficialización de la actual Filial Provincial y el aniversario 19 de KEA. A la festividad, se sumaron esperantistas de Santiago y Guantánamo y el resto de los campistas. Otra forma de propaganda.

El 25 de mayo, la Comisión Central celebró su IV Reunión, con delegados de todas las provincias que abarca, excepto Ciego de Avila, y dos directivos nacionales. Esta vez, la sede fue Cienfuegos. Se chequeó la labor realizada desde la anterior cita (Sancti Spiritus, 25-26/4/97) y se trazaron las principales tareas hasta la próxima (Sto. Domingo, V. Clara, en 1999). Las dos primeras reuniones se efectuaron en Morón (nov./94) y Pedro Betancourt, Matanzas (jun/96).

El 26 y el 27 de mayo, también en la Perla del Sur, se desarrolló un Encuentro Nacional, al que asistieron más de 30 personas, en representación de las filiales y grupos de Granma, Holguín, Las Tunas, Camagüey, S. Spiritus, V. Clara, Matanzas, C. de La Habana y miembros de la Directiva Nacional, los que disfrutaron del programa previsto por el naciente movimiento de la provincia sede, que ya da muestras de capacidad organizativa. ¡Éxitos!

Durante junio, la exposición itinerante «Esperanto: Lengua, cultura, movimiento», estuvo en la Biblioteca Nacional José Martí, con más de 140 libros, revistas, fotos, etc, clasificados en ocho temas: El fenómeno Esperanto, Lengua viva y funcional, Literatura original y traducida, Ciencia y técnica, Universo infantil, Publicaciones y emisiones periódicas, El Esperanto en Cuba, y Cubanos en el mundo esperantista. Granma, Santiago de Cuba y otras provincias orientales esperan por ella.

Junio estuvo particularmente caracterizado por la información radial en favor del Esperanto. Numerosas fueron las entrevistas para «Juventud 2000» (Radio Progreso), «Tal como somos» y «Entre colegas» (ambos de Radio Habana Cuba), «Meridiano» (COCO), «Mezcla» (Metropolitana), «De todo» (Radio Ciudad de La Habana), «Así», «Haciendo Radio» y «Exclusivo» (los tres últimos, de Radio Rebelde), y otras (sin contar las que están previstas para julio.)

(Tomado de UNIVERSO, no. 7, mayo-junio '98, p. 2.)

PENSOJ PRO LA XIX-a DATREVENO DE KEA

Juan Lázaro Besada Toledo

Novan junion, ni kune celebras,
celebrante la naskiĝon de KEA,
la ĝojo de nia vivo trapenetas
ĉiujn obstaklojn per laboro krea.

Printempas nia voĉo deknauĵara;
en ĝi vibras akcentoj de l' paseo
de l' majstr' genia, de la venko kara,
de l' simpla homo kaj la korifeo.

Ni ĉizas en la koro la idealon
al kiu konsekriĝis nia vivo
kaj ĉiam avance, ni iru en la valon
kie floras Esperanto.

Sub la gvido de aŭdacaj, avangardaj kapitanoj,
nia Asocio pluiros laŭ la vojo
same kiel por la unuaj kristanoj
ankaŭ por ni aperos baptogloro.

Ne eblas ŝtopi de l' kor' la entuziasmon
ĉar ĝi neniel ion ajn uzurpos:
ni venkos eĉ la plej kruelan sarkasmon,
la torento de amo, neniam turpos.

KEA vibre floras sub nia epidermo,
en koroj vervaj kaj en cerboj helaj;
ĝi ja estas por ni fortiga ĝermo
de fruktoj amodonaj, noblaj, belaj.

Al ĝi, por ĉiam ligiĝis nia espero
de homaro pli verva kaj racia,
kie regos am', anstataŭ revolvero;
kaj, anstataŭ insult', parol' poezia.

Al tiu komuna dom', ni ĉiam fordonu
ĉion bonan de nia kor' kaj energio.
ĝian estontecon per laboro, abonu
ĉar ĝi estas nia sang' kaj fantazio.

FRANSISKA KAJ LA MORTO

Onelio Jorge Cardoso
(Rakonto)

Esperantigis: *Norberto Díaz Guevara**

-Sanktan kaj bonan tagon -diris la Morto, sed neniu el la ĉeestantoj povis rekoni ŝin. Kompreneble! Venis la parco kun sia harplektaĵo retordita sub la ĉapelo kaj la flava mano en la poŝo.

-Se mi ne ĝenas -ŝi diris-, mi volas scii kie loĝas sinjorino Fransiska.

-Nu, vidu -oni respondis, kaj irinte al la pordo, viro montris per sia kruda fingro de kampulo.

-Tie, ĉe la bambuoj batataj de l' vento, ĉu vi vidas? Estas vojo ĝis la monteto. Tie, vi trovos la domon.

"Farite!" -pensis la Morto kaj, dankinte, ŝi sekvis la vojon en tiu mateno, kiam ĝuste estis malmultaj nuboj en la ĉielo kaj la tuta bluo lume glimis.

Irante, do, la Morto rigardis la horloĝon kaj eksciis ke estis la sepa matene. Ĉirkaŭ la unua kaj kvarono posttagmeze, estos jam markita en la listo sinjorino Fransiska.

-Bonŝance; malmulte da laboro, nur unu tasko -diris al si la Morto, kontenta ne laciĝi, kaj plu iris, en vojo plenplena de romerijo¹ kaj rozo.

Fakte, tio okazis en majo kaj, pro la pluvegoj falintaj, nenia sovaĝa semo aŭ ŝoso restis subtere ne aperinte sub la sunon. La branĉidoj de la bombakoj² similis travideblan mahagonon. La trunko del gujavujo ie-tie perdadis la ŝelon kaj videblis la kerno mem de la ligno. La kanokampoj ne havis eĉ unu flavan folion.

Ĉio estis verda, eĉ ĉielo kaj aero, kaj vivodoro emanis el la floroj. Estis normale ke la Morto ŝtopis al si la nazon. Estis logike ankaŭ ke ŝi eĉ ne rigardis la multajn branĉojn plenajn de nestoj, nek tiom da abeloj sur la floroj. Sed kion fari? Estis la Morto nur momenton ĉi tie, kie ne estis sia regno.

Tiel, do, paŝis kaj paŝis la Morto sur la vojoj, kaj ŝi alvenis la domon de Fransiska.

-Bonvolu, ĉu mi povus paroli kun Franjo? -flate diris la Morto.

-Avino frue eliris -respondis kun timeto ĉarma nepino, kvankam la parco ankoraŭ havis la harplektaĵon sub la ĉapelo kaj la manon en la poŝo.

-Kaj, je kioma horo ŝi revenos -ŝi demandis.

-Kiu scias! -diris la patrino de la infanino- Tio dependas de la farenadaĵoj. Ĉe la kamparo, ŝi estas laborante.

**Norberto Díaz Guevara (Sancti Spiritus) ricevis la ununuran premion en la 1-a Nacia Tradukkonkurso (1997), pro la bonkvalita labortraduko kaj pro la fideleco rilate la originalon. Oni premiis lin dum la pasinta Komitatkunsido (Bayamo, februaro 1998). Membris la jurio: Pedro Fernández Rodríguez, Fernando Paredes Elósegui kaj Alberto Rodríguez Pineda.*

La morto mordis al si la lipojn. Estis tro plu paŝi en tia mondo bela kaj malpropra.

-Estas forta suno. Ĉu eblas atendi ŝin ĉi tie?

-Kiu venas ĉi-tien, tiu konsideru sia la hejmon. Sed eble, ŝi ne revenos antaŭ la vespero aŭ la nokto.

"Diable!" pensis la Morto. "Mi perdos la trajnon de la kvina horo. Ne, mi plibone iru ŝin serĉi". Kaj per pli laŭta voĉo, diris la Morto:

-Kie, tute certe, eblas ŝin trovi?

-Frumatene, ŝi iris melki. Certe, ŝi estas ĉe la maizo, semante.

-Kaj kie estas la maizkampoj? -Demandis la Morto.

-Iru laŭ la barilo kaj vi poste vidos la plugitan kampon.

-Dankon -simple diris la Morto kaj denove ŝi ekiris.

Ŝi rigardis la tutan vastan kampon plugitan, sed eĉ unu animo ne troviĝis tie. Nur ardeoj. Ŝi liberigis la harplektaĵon kaj plendegis.

"Paŝema maljunulino! kie vi estas?" Ŝi kraĉis kaj sencele laŭiris la vojon.

Post unu horo, kun la harplektaĵo rostita sub la ĉapelo kaj la nazo naŭzita pro la odoro je juna herbo, la Morto renkontis piediranton.

-Sinjoro, ĉu vi povas sciigi min kie troviĝas Fransiska?

-Vi estas bonŝanca -diris la piediranto. -Ŝi estas ĉe Noriega de antaŭ duona horo. La infano malsanas kaj ŝi iris mankuraci lian stomakon.

Dankon -pafis la Morto kaj rapidegis.

Malfacila kaj laciga estis la vojo. Krome, ŝi tiam piediris sur ĵus plugita kampo, sen vojetoj, kaj estas sciate kiel malkonforte estas meti la piedojn sur malgratan kaj freŝe molan grundon, kie perdiĝas duono de la streboj.

Tiel, do, la Morto, inda ie kompatato, alvenis al la domo de Noriega.

-Voku Fransiskan, se vi estas tiel kompleza.

-Ŝi jam foriris.

-Ne! Ĉu tiel rapide?

-Kial tiel rapide? -estis la respondo- Ŝi venis nur helpi nin pri la infano kaj tion ŝi faris. Kial surpriziĝi?

-Nu... komprenu... -diris la Morto konfuzita-, ĉar ni, virinoj, ĉiaokaze interbabilas ĉetabile, mi kredas.

-Vi, do, ne konas Fransiskan.

-Mi konas ŝiajn trajtojn -burokrate diris la malpiulino.

-Ek! Menciuj ilin -pafis la patrino. Kaj la Morto diris:

-Nu... ŝi havas haŭtsulkojn, kompreneble; ŝi aĝas 60 jarojn...

-Kaj kion pli?

-Nu... la blanka hararo... preskaŭ neniu denaska dento... la nazo, ni diru...

La morto mordis al si la lipojn. Estis tro plu paŝi en tia mondo bela kaj malpropra.

-Estas forta suno. Ĉu eblas atendi ŝin ĉi tie?

-Kiu venas ĉi-tien, tiu konsideru sia la hejmon. Sed eble, ŝi ne revenos antaŭ la vespero aŭ la nokto.

"Diable!" pensis la Morto. "Mi perdos la trajnon de la kvina horo. Ne, mi plibone iru ŝin serĉi". Kaj per pli laŭta voĉo, diris la Morto:

-Kie, tutcerte, eblas ŝin trovi?

-Frumatene, ŝi iris melki. Certe, ŝi estas ĉe la maizo, semante.

-Kaj kie estas la maizkampoj? -Demandis la Morto.

-Iru laŭ la barilo kaj vi poste vidos la plugitan kampon.

-Dankon -simple diris la Morto kaj denove ŝi ekiris.

Ŝi rigardis la tutan vastan kampon plugitan, sed eĉ unu animo ne troviĝis tie. Nur ardeoj. Ŝi liberigis la harplektaĵojn kaj plendegis.

"Paŝema maljunulinol; kie vi estas?" Ŝi kraĉis kaj sencela laŭiris la vojon.

Post unu horo, kun la harplektaĵo rostita sub la ĉapelo kaj la nazo naŭzita pro la odoro je juna herbo, la Morto renkontis piediranton.

-Sinjoro, ĉu vi povas sciigi min kie troviĝas Fransiska?

-Vi estas bonŝanca -diris la piediranto. -Ŝi estas ĉe Noriega de antaŭ duona horo. La infano malsanas kaj ŝi iris mankuraci lian stomakon.

Dankon -pafis la Morto kaj rapidegis.

Malfacila kaj laciga estis la vojo. Krome, ŝi tiam piediris sur ĵus plugita kampo, sen vojetoj, kaj estas sciate kiel malkonforte estas meti la piedojn sur malgratan kaj freŝe molan grundon, kie perdiĝas duono de la ŝtreboj.

Tiel, do, la Morto, inda ie kompato, alvenis al la domo de Noriega.

-Voku Fransiskan, se vi estas tiel kompleza.

-Ŝi jam foriris.

-Ne! Ĉu tiel rapide?

-Kial tiel rapide? -estis la respondo- Ŝi venis nur helpi nin pri la infano kaj tion ŝi faris. Kial surpriziĝi?

-Nu... komprenu... -diris la Morto konfuzita-, ĉar ni, virinoj, ĉiaokaze interbabilas ĉetabile, mi kredas.

-Vi, do, ne konas Fransiskan.

-Mi konas ŝiajn trajtojn -burokrate diris la malpiulino.

-Ek! Menciui ilin -pafis la patrino. Kaj la Morto diris:

-Nu... ŝi havas haŭtsulkojn, kompreneble; ŝi aĝas 60 jarojn...

-Kaj kion pli?

-Nu... la blanka hararo... preskaŭ neniu denaska dento... la nazo, ni diru...

-Ni diru kion?

-Maldika...

-Ĉu tio estas ĉio?

-Cetere, nomo kaj familinomo.

-Sed vi ne parolis pri ŝiaj okuloj.

-Bone, nebulitaj... jes, nebulitaj ili devas esti...sekaj pro la jaroj.

-Ne; ŝin vi ne konas -diris la virino. -Ĉio dirita estas vera, sed ne tio pri la okuloj. Ŝi havas malpli da jaroj en la rigardo. Tiu, kiun vi serĉas, ne estas Fransiska...

Kaj la Morto troviĝis denove sur la vojo. Tiam ŝi, malkontenta, piediris ne atentinte pri la mano kaj la harplektaĵo, kiu duone aperis sub la ĉapelrando.

Ŝi paŝis kaj paŝis. Ĉe González ŝi sciis, ke Fransiska estis je okulrigardo de tie, tranĉante herbojn³ por la bovino de la nepoj. Sed la Morto vidis nur la herbon ĵus tranĉitan kaj nenion pri Fransiska, eĉ ne la delikatan spuron de ŝia piedo.

Tiam la Morto, kiu jam havis la piedojn ŝvelitaj ene de la pro la koto malpuraj botoj, kaj la ĉemizon nigra, tro malseka pro la ŝvito, elprenis sian horloĝon:

"Dio! La kvara kaj duono! Ne eblas ĉifoje! Mi perdos la trajnon!"

Kaj la Morto foriris, malbenante.

Dume, du kilometrojn de tie, Fransiska senherbigis la lernejan ĝardenon. Malnova konato surĉevale trapasis kaj ridante li tenere salutis ŝin.

-Frasiska, kiam vi mortos?

Ŝi stariĝis kaj aperis parto de ŝia korpo sur la rozoj. Ŝi redonis gajan saluton.

-Neniam. -Ŝi diris -Ĉiam estas io farenda.

Notoj:

¹ROMERIJO: En Kubo, komuna planto, kies floroj estas blankaj aŭ flavaj. Uzata kiel kuracilo, ĝi estas konata kiel ROMERILLO (Kubo kaj Portoriko), MANZANILLA DEL PAIS, MARGARITA (Portoriko), SHEPHERD'S NEEDLE (Usono), CADILLO ROCERO (Venezuelo). *Bidens pilosa* L. Var *radiata*. Sinonimoj: *B. Leucantha* Willd, *Coreopsis Leucantha* L. (Dr. Juan Tomás Roig y Mesa: *Plantas medicinales, aromáticas o venenosas de Cuba.*) Miaopinie, la novvorto ROMERIJO ne montriĝas tro stranga.

²En Plena Ilustrita Vortaro, aperas la vorto BOMBAKO; sed, en Lexicón, aperas BOMBAKSO. Mi preferis konsideri korekta tiun de PIV.

³PANGOLA. Temas ja pri herbo, tipa en Kubo; sed por la fluo de la rakonto, tute ne gravas la nomo. La novvorto PANGOLO, aŭ iu simila, aperus tro fremda en tia facilflua rakonto, kies mesaĝo estas la plej grava.



LIBROSERVO RAPORTAS

Juan Ramón Rodríguez Gómez

Kelkfoje, esperantistoj demandas (perletere aŭ persone) kiaj libroj aĉeteblas ĉe ni, k. tiuj demandoj bezonas longan kaj detalan titolaron ne ekzistantan ĝis nun. Jen la ĝenerala katalogo de nia Libroservo.

Ĝenerala katalogo

TITOLO

Akuzativo. Ekzercaro
 Al abelujo ĝi flugas
 Angla Antologio (100-1800)
 Arĉoj
 Baza vortaro por komencantoj
 Brulo kaj ritmo
 Bukedo el la hungara poezio "Disko"
 Cent jaroj de Matica Slovenská
 Ĉiama memor-kalendaro
 Ĉu vi konas la teron?
 Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto
 Dicc. Lexicón Esperanto-Español/Español-Esperanto 1989
 Dicc. Lexicón Esperanto-Español/Español-Esperanto 1990

AŬTORO

KEA
 Juhan Liiv
 W. Auld / R. Rossetti
 Geraldo Mattos
 KEA
 A. Agostinho Neto
 -
 A. Matovčík / P. Liba
 Erich Quentin
 Endre Dudich
 János Elem
 J. Paluzie-Borrell
 J. Paluzie-Borrell

TITOLO

AŬTORO

Dokumentoj kaj materialoj	M. Gorbačov
Dum nokta deĵoro	Nevema Nedelčeva
Ekzercaro (Unua Nivelo)	Julián Hernández
Ekzercaro (Dua Nivelo)	Julián Hernández
Ekzilo kaj azilo	Emba
Elektitaj eroj de Nikolaj Rytjkov *disko*	-
El la polvo de la tero	William F. Rolt
El tero kaj etero	Julia Pióro
Esperanta Antologio (1887-1981)	William Auld
Esperanto und Wissenschaft	Detlev Blanke
Esploroj	Baldur Ragnarsson
Estona soveta poezio	Hilda Dresen
Fajrolumo en la fronto	Liu Benjü
Fajro sur mia lango	Edwin de Kock
Fina akto de la Konf. pri Sekureco kaj kuni. en Eŭropo	-
¿Hacia una lengua para Europa? El fut. de la Babel europea	Mark Fettes
Historio de la E-Movado en Kubo (I-a eldono)	Juan R. Rodríguez
Homo	E. Miezelaitis
Homoj sur la tero	Stellan Engholm
Infoduktoj	Luc De Brabandene
Invit' al japanesko	Miyamoto Masao
Japana kvodlibeto	T. Nakamura / M. Masao
Jordan Jovkov (bibliografio)	-
Juliano kantas	Julián Hernández
Kantoj kaj romanoj	Heinrich Heine
Kanzonaro '98	KEA
Karlo	Edmond Privat
Kolektitaj poemoj	L.N.M. Newell
Kongresa Libro (70-a UK)	UEA
Kontralte	Marjorie Boulton
La arbo de la sciado	Pio Baroja
La bela subtera mondo	Leander Tell
La doktrino de K. Marks k. kelkaj aspektoj de...	Ju. V. Andropov
La ĝenerala instruado en V.D.R.	-
La historiaj radikoj de nealianciĝo	Eduard Kardelj
La kvarteto de Mendelssohn kaj aliaj rakontoj	J. Iwaszkiewicz
La lao-revolucio dudekjara	-
La lingva probl. de la movado de nealiancigitaj landoj...	-
La mastro de Korboja	A. H. Tammsaare
La «Mio» kaj lia pretero	Dun Karm
La paperoj	Ante Ramljak
La revolucia homo en la kosma epoko	Anthony Brooke
La turoj de l' ĉefurbo	Mauro Nervi
La tuta Esperanto	Henrik Seppik
La Vjetnama kaj ĝia utiligo por la supera instruado en V.D.R.	-
Language in Religion	-

TITOLO

Leteroj el Ĉinio
 Lukto kontraŭ la analfabeteco
 Malgranda monografio
 Malriĉaj homoj
 Martín Fierro
 Merlo sur Menhiro
 Mia porpaca agado
 Naŭ jaroj en la infero
 Norda naturo
 Nova Ezopo
 Nur tri kolorojn
 Esperanto kiel revelacio
 O Espirito de Zamenhof
 Okupacio
 Omaĝo al Gaston Waringhien
 Ombroj de la kvara dimensio
 Parolo en U.N.
 Perkomputila tekstoprilaboro
 Pinta krajono
 Poemaro por paco
 Prez. Ho-Chi-Minh, respektiginda gvidanto de la vjetn. pop.
 Provo alfronti la vivon
 Radioteknika artikolaro (1984)
 Rakontoj I
 Rap. de la C.K. de la B.K.P. al la 13a Partia Kongreso
 Rap. de la C.K. de B.K.P. antaŭ la 12a Kong. k....
 Reekŝoj
 Renkonte al la 12-a Tutmonda Festivalo
 Renovigan ideologion por la revolucia rekonstruo
 Resp. de M. Gorbaĉov al demandoj de... «L' Humanité»
 Sabe Ud. Esperanto? (Resumita versio I)
 Sabe Ud. Esperanto? (Resumita versio II)
 Schlüssel
 Sen paraŝuto
 Sociolingvistikaj aspektoj de la IL
 Soifo
 Sub stelo rigida
 Sursojle de la 6-a Kongreso de la Vjetn. Kom. Partio
 Ŝtupoj sen nomo
 Testamento de prezidento Ho Chi Minh
 Unufingraj melodioj
 Ventolume
 Vesperkanto
 Vetero kaj klimato de la mondo
 VI-a Tutl. Kongreso de la Vjetn. K.P.
 Viveroj
 Vojo kaj vorto

AŬTORO

Anna Louise Strong
 -
 Bozena Nemcová
 Zsigmond Móricz
 José Hernández
 Albert Goodheir
 Nikola Aleksiev
 Naĉo Kemalov
 Hilda Dresen
 Ŝtefo Urban
 Eli Urbanová
 Fco. Cândido Xavier
 Adolfo Nunes
 Erni Krusten
 -
 Edwin de Kock
 Miĥail Gorbaĉov
 Ilona Koutny
 Reto Rossetti
 -
 Truong-Chinh
 Ivan St. Georgiev
 -
 F. Kafka
 -
 T. Jivkov
 -
 V. Aksjonov
 M. Gorbaĉov
 M. Gorbaĉov
 Jorge Hess
 Jorge Hess
 Jung und Wingen
 Poul Thorsen
 -
 Lajos Tarkony
 Porsteinn frá Hamri
 -
 Baldur Ragnarsson
 Ho-Chi-Minh
 William Auld
 Debora Vaarandi
 Hendrik Adamson
 D. Riley / L. Spolton
 -
 A. Rodríguez Castelao
 R. Passos Nogueira

I-a Nacia Infanrenkontiĝo

NIA ESTONTECO VIBRAS

Julián Hernández Angulo

Ludoj, kantoj, poemoj, dancoj kaj skeĉoj ornamis kaj kreis mirindan esperantistan etoson dum la Nacia Infanrenkontiĝo. La ideo, proponita de kelkaj aktivuloj niaj -dum la XVa Komitatkunsido, en Bayamo, Granma-, fine realiĝis, de la 16a ĝis la 18a de julio, en la kampadejo Daniel Llosa, en Guantánamo.

La realigo de la Infanrenkontiĝo sukcesis dank' al la serioza, fervora kaj entuziasma laboro de la teamo de nia plej orienta provinca filio kaj de la sindonema kaj persista agado de la infankursgvidantoj tra la lando, kiuj preparis la diversajn programerojn ĝisdetale por sukcesigi la eventon.

Tridek ok infanoj el Matanzas, Stgo. de Cuba, Granma k. Guantánamo iris al la pionirkampadejo akompanataj de instruistoj k. gepatroj, por interamikiĝi kaj pasigi agrablajn momentojn pere de E-o. Instrukistoj kaj aktivuloj ĉeestintaj trovis spacon por dividi spertojn rilate la infanlaboron kaj ties perspektivojn.

Nepre, menciindas la solena infanvespero kiun organizis la gastigantoj en la teatro Actualidades kun la ĉeesto de pli ol 200 personoj. La infanoj prezentis buntan kaj belan artan programon kiu mirigis ĉiujn. La muzikensemblo "J" kaj la infanĥoro Vitraj Voĉetoj pliriĝigis la programon per kantoj en E-o.

Mia koro vibras kun la estonteco de nia movado. Por ĉiam, restos en mia koro ĉio travivata inter tiuj, kiuj estas la espero de la movado. Ĝuste pro tio, mi gratulis ĉiujn kiuj, iel aliel, kontribuis al la sukceso de la renkontiĝo, eĉ al tiuj kiuj lastmomente ne povis partopreni pro transportaj malfaciloj.

Ĝis la jaro 2000, en Bayamo, Granma!

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro